# Novjorka Prismo


Numero 135 | Junio 2004




## Esperanto Society of New York

## VENU AL NIA SOMERA PIKNIKO!

### Come to our Summer Picnic!



**When:** **Saturday, June 19, 2004**, 11 A.M. *Rain date: Sunday, June 20, or 6/26 or 27.* Call Tom in the morning (212-477-6516) if in doubt about the weather.


**Where:** **Bryant Park**, 42nd Street between Fifth & Sixth Avenues (directions, page 2).

**Bring:** Lunch for yourself or to share, songs to sing, musical instruments to play, Esperanto poems, jokes, or short stories to read aloud, games, balls, etc.

**Children, family, and friends are all welcome!**

## Protokolo de la kunveno de la 21-a de majo 2004

Je 6:30 ptm, Tomaso ECCARDT kaj Maki SANO sukcesis ĝuste funkciigi la vidbend-aparaton. Tiuj ĉeestantoj, kiuj jam alvenis, rigardis kaj aŭskultis la dulingvan prelegon, en la japana kaj en Esperanto, kiun oni nur povis aŭskulti ĉe la aprila kunveno. Poste, Tom kaj Maki montris parton de alia vidbendaĵo pri Esperanto, en la portugala, sed tio ne interesis al la plejparto de la ĉeestantoj, ĉar ili ne povis ĝin kompreni, do oni malŝaltis ĝin.



*Alex Karkovsky.*


Je 7:00 ptm, Tomaso oficiale malfermis la kunvenon. Asghar SAJADIAN el Vieno, Aŭstrio, origine el Irano, ĉeestis. Neniuj novaj gastoj ĉeestis. Je la komenco, ĉeestis 12 personoj, sed Nijl BLONSTEIN, Tamara, kiu estas la edzino de Alex KARKOVSKY, Anna KSHONDZER kaj ŝia edzo, Jacob, alvenis je la ĝusta tempo por la festo de la 70-a naskiĝtago de Alex, pro tio, ĉeestis 16 personoj oficiale.

Oni menciis pri kelkaj etaj mistajpaĵoj en la *Novjorka Prismo*, ekzemple, la uzo de la vorto "rendenki" (repensi) en la artikolo de Tomaso, kaj la malĝustaj epoŝtaj adresoj de Alex. Tomaso diris, ke miskompreno inter li kaj Jim MEDRANO kaj manko da tempo kaŭzis la malbonan redaktadon. La protokolo estis akceptata sen ŝanĝoj.

La ĉeestantoj decidis, ke la jara pikniko okazos ĉe Bryant Park, sabaton, la 19-an de junio. La unua pluvdato estas la venonta tago, kaj la aliaj pluvdatoj okazos la venontan semajnfinon. Bryant Park, ĉe la angulo de la Sesa Avenuo kaj la 42-a Strato, estas tre konvena loko, apud la Novjorka Publika Biblioteko.

Membro de UFT eniris la ĉambron, kaj li klarigis, ke post la kunveno, la ĉeestantoj devas foriri tra alia elirejo en la alia konstruaĵo, ĉar laboristoj faros truojn en la piedirejo apud nia kutima enirejo. Li ankaŭ menciis, ke estas multaj manĝaĵoj forlasitaj de festo en alia ĉambro, kaj li invitis al ni finmanĝi ĝin.

La ĉeestantoj ankaŭ menciis pri diversaj lokoj por klubaj eventoj dum la somero: Esperanto Kafejo, Esperanto Restoracio, Kolumbia Universitato, Korona Parko, Japana Muzeo, kaj prezentoj de la Novjorka Filharmonia Orkestro kaj de la verkoj de Ŝekspiro en Centra Parko.



*Asghar Sajadian*

Tomaso ankaŭ menciis pri la kandidatiga komitato. Ĉiujare, tri klubanoj devas volontuli por servi je la komitato. La komitato certigas, ke estas almenaŭ unu kandidato por ĉiu posteno de la kluba estraro. La tasko ofte facilas, se ĉiuj nuntempaj estraranoj volas resti en la samaj postenoj. La komitatanoj foje devas trovi aliajn personojn, aŭ eĉ volontuli sin mem por postenoj. Post kelkaj minutoj da diskuto, ni elektis niajn tri volontulojn: Jeff BLAKESLEE, kiu estas la estro de la komitato, ĉar li estis la unua volontulo, Maki SANO, kaj Rochelle F. GROSSMAN. Tomaso parolis pri la ebleco, ke la posteno de program-direktoro eliminiĝos, kaj ke la prezidanto faros la taskojn de tiu posteno.

ŜIJIMIN menciis, ke ŝi volas instrui al studantoj ĉinan kanton en Esperanto.

Je 7:45 ptm, la bruo de la laboristoj sur la strato estis tro laŭte, do la ĉeestantoj translokiĝis al la alia ĉambro, kie troviĝis la manĝaĵo de la alia festo. Post la manĝado kaj la trinkado, la du prelegoj okazis.

Je 8:00 ptm, Alex KARKOVSKY prelegis pri siaj spertoj en la Esperanta movado en USSR post la morto de STALIN. Li unue konatiĝis kun profesoro, kaj poste kun aliaj esperantistoj.

Je 8:30 ptm, Asghar SAJADIAN prelegis pri la historio kaj tradicio de Islamo. Li klarigis pri la konflikto inter la diversaj sektoj de Islamo.

Je 9:00 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon, kaj la ĉeestantoj eliris la konstruaĵon kun la helpo de laboristino, kiu kondukis nin al la pordo de la alia konstruaĵo. Poste, la plejparto de la ĉeestantoj restis sur la strato, ekster la konstruaĵo, interparolis, kaj adiaŭis. Je 9:30 ptm, kelkaj ĉeestantoj iris al Cafe World por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*

## Ĉu via lasta *Prismo*?

Estas la politiko de ESNY sendi sian novaĵ-leteron nur al homoj kaj grupoj kiuj resendas la verdan slipon (aliĝilon). Tio helpos nin direkti *Prismon* al la homoj kiuj plej ĝuas ĝin. Do en septembro, se vi ankoraŭ ne resendis la slipon, anstataŭ ekzemplero de *Prismo*, vi ricevos leteron, kiu klarigos kiel vi povas renovigi vian abonon. ★

## ESNY SUMMER CALENDAR 2004

The following Esperanto get-togethers will take place this summer.
For more information, directions, etc. contact Thomas Eccardt, or one of the other officers listed below.

| | |
|---|---|
| **June 19**<br>**Saturday 11:00 AM** | **Bryant Park.** South side of 42nd Street between Fifth and Sixth Avenues. Our annual ESNY summer picnic. Meet at tables and chairs near the statue of W.C. Bryant, just behind the Library. If in doubt about the weather call Tom Eccardt at 212-477-6516 before 10:15 am. Rain date is Sunday, June 20, or else June 26-27. |
| **July 4**<br>**Sunday 1:00 PM** | **IBM Plaza.** 590 Madison Avenue at 56th Street (officially called 590 Madison Avenue). Indoor babilado. Rain or shine. If IBM Plaza is closed because of the holiday, try Sony Plaza, one block South. |
| **July 16**<br>**Friday 6:30 PM** | **"Chitty Chitty Bang Bang" free film at Riverflicks on Pier 25.** Franklin Street at the Hudson River. Take the #1 train to Franklin St. and walk west; or the #1, 2, 3, A, C, or E train to Chambers St., walk west to the Hudson River, then walk north. If you can't find where we are seated, wait near the projector, until we notice you. The movie will begin at dark (8:00-8:30PM). Seating and free fresh popcorn. No rain date. |
| **August 1**<br>**Sunday 1:00 PM** | **Noguchi Garden.** Abstract sculptures by Asian-American artist Isamu Noguchi. Admission $5, $2.50 seniors and students. Take W or N train to Broadway station in Queens. Transfer to #108 bus (northwest towards Manhattan) or walk 8 blocks to Vernon Avenue at East River. Go one block south to Noguchi Museum at 09-01 33rd Road. Meet in the outdoor sculpture garden (past the admission desk). If it rains, meet at sheltered area of the garden near gift shop. If weather is good, we can stroll later in nearby Socrates Sculpture Park. |
| **August 20**<br>**Friday 7:00 PM** | **Esperanto Restaurant.** Ninth Street and Avenue C. Note later time. "Pan-Latin" cuisine. Moderately priced. |
| **September 5**<br>**Sunday 1:00 PM** | **Stuyvesant Town Oval.** East of First Avenue between 16th and 18th Streets. The "Oval" is a large tree-lined grassy area at the center of Stuyvesant Town. Walk east from First Avenue along 16th or 18th Street until the street 'turns' at the basketball playground. The Oval is at the far end of the playground. Facilities available for ping pong, basketball, shuffleboard, bocci, etc. In case of rain, we'll meet at the home of Jim & Nancee Medrano (address at bottom of page). For weather decision or to find us call Jim's cell phone 917-570-7341. |
| **September 17**<br>**Friday 6:30 PM** | **United Federation of Teachers.** Next regular ESNY meeting. Come hear about the summer's Esperanto conferences and tell us about your summer! ★ |

## IBM Plaza

La 6-an de junio pli malpli dek novjorkaj esperantistoj ĉeestis neformalan kunvenon ĉe IBM Plaza. Oni babiladis pri multaj aferoj, inkluzive la venontan transiron de Venuso preter la Sunon.


Unu horon antaŭe, tamen, la estraro kunvenis por priparoli kelkajn aferojn. Unu estis ebla nuligo de la posteno program-direktoro kaj transdono de la taskoj al alia estrarano. Dum jaroj estis malfacile trovi taŭgan homon, kiu respondecе plenumas ĝiajn devojn; krome, nia klubo iom malgrandiĝis, do eble sep-homa estraro estas jam tro granda. Tia ŝanĝo postulus statutajn ŝanĝojn, kaj tiajn detalojn ni diskutis. Oni interkonsentis (sed ne formale voĉdonis) ŝanĝi estraran kvorumon de kvin al kvar, se oni eliminos unu postenon. Oni donos la labron aŭ al la vicprezidanto aŭ al la prezidanto.

Iu ajn ŝanĝo dependos de formalaj estrara kaj klubana voĉdonadoj. Ni decidis atendi iomete la agadon de la kandidatiga komitato, por vidi ĉu ili povas trovi taŭgan kandidaton por program-direktoro. ★

*– Tom ECCARDT*

## How to get to the picnic

Our annual picnic will be held in Bryant Park between Fifth and Sixth Avenues, at south side of 42nd Street. Take the B, D, F or V train to 42nd Street and Sixth Avenue. Or the 7 train to Fifth Avenue. Or the N, Q, R, S, W, 1, 2, 3, or 9 train to Times Square and walk one block east. Or take Fifth or Sixth Avenue buses #1 thru #7 to 42nd Street. Car parking would be difficult. Meet at tables and chairs near the statue of W.C. Bryant, just behind the Library, nearer to Fifth Avenue. ★




www.bryantpark.org


**ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO**
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Korespondа Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020



**Novjorka Prismo**
Numero 135 – Junio 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2004 Esperanto Society of New York